N°249 MARTO 2012

FN Per AnC 47

# NORMANDA ESPERANTO BULTENO

# ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot sur Seine.
Tel. 02 35 34 28 78. LEMARCHANDPI@wanadoo.fr
Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

## 3 Belaj Printempaj Rendevuoj en Normandio

### Rodica TODOR

kadre de prelegvojaĝo, restados en Caen de la **11a ĝis la 14a de marto**. Jen la programo :
11an de marto : Vizito de Rouen kun tagmanĝo.
12an de marto : Vizito de Caen kaj de la marbordo. 18h00 inaŭguro de ekspozicio pri Rumanio (fotoj de Catherine Nicolas-Gautier) en Maison des Associations de Hérouville Saint Clair
13an : Vizito de Honfleur kun tagmanĝo. 18h00 : publika prelego pri Rumanio en Maison des Associations, 10-18 quartier du Grand Parc Hérouville. Post la prelego ni kune manĝos en Maison des associations, ĉiu alportu manĝaĵon/trinkaĵon.


Samideanoj de Rouen kaj Le Havre estu bonvenaj dum la vizitoj en Rouen kaj Honfleur. Por rendevui, bonvolu kontakti Yves NICOLAS : 06 44 87 22 48 / nicosibi@club-internet.fr



Rodica (Rodika) estas rumana psikologo kaj prezidanto de IFEF : Internacia Federacio de Esperantaj Fervojistoj.


### Anna LÖWENSTEIN

prelegos en Maison des Associations de Hérouville Saint Clair la **8an de majo**, je 18h30. Temo : Romo antaŭ 2000 jaroj. Anna estas britino loĝanta en Italio, kun Renato Corsetti. Ŝi estas membro de la Akademio kaj konata kiel verkisto de tre bonaj romanoj « La ŝtona urbo » kaj « Morto de artisto ». Ŝi estas sekretario de ATEO, Ateista Tutmonda Esperanto Organizo.



Nia Prezidanto Yves NICOLAS alvokas vin :

Ĝenerala Asembleo : 13an de majo en Hérouville !



## En tiu numero :


| | |
|---|---|
| Raporto pri Trevor Steele | 2 |
| Prelego pri Lanti | 2 |
| Pri Lanti. Marc Lemeltier | 4 |
| La Fajro. Sro Rousseau | 5 |
| Ĝenerala Asembleo 2012 | 6 |
| Roman Dobrzynski. Financa raporto 2011. | 6 |


Via bultenisto kaj kasisto dankas ĉiujn, kiuj sendis bondezirojn kaj afablajn vortojn pri tiu nova jaro. Feliĉan kaj pacan novjaron por ĉiuj !

## Raporto pri la prelego de Trevor Steele

La konferenco de Trevor Steele okazis en Hérouville Saint Clair la 19an de oktobro en ĵus kreita «Kafejo Puŝkin ». Ĉeestis 45 homoj, proksimume trione ne esperantistaj. Trevor prelegis pri aborigenoj, kiu estis tre alloga temo, cetere elektita de ĉiuj kluboj kiuj lin akceptis kadre de trisemajna turneo en Francio.

La aborigenoj invadis Aŭtralion 10 000 jarojn antaŭ Kristo. Kiam Kapitano James Cook, en 1880 plantis norde de la insulego la britan flagon nome de la Reĝo George la IIIa, li konstatis, ke la aborigenoj ĉasis kaj plukis sufiĉe da nutraĵoj por trankvile vivteni, eĉ sen vestoj pro dolĉa klimato. Li opiniis, ke ili pli bone vivas ol la tiamaj eŭropanoj. Ekzistis unu miliono da loĝantoj parolantaj proksimume 230 lingvojn kaj dialektojn.

Sed baldaŭ la britoj ŝtelprenis la terenojn de la aborigenoj. Bovoj, ŝafoj, porkoj forpelis la sovaĝajn bestojn kiujn tradicie ĉasis la aborigenoj : dingojn , kanguruojn, ktp. Nun proksimume 40 000 homoj loĝas en rezervejoj kaj 400 000 en la tuta lando sin deklaras aborigene devenaj.

Dum unu jaro kaj duono, Trevor Steele fariĝis instruisto en rezervejo sed la afero estis malfacila pro kontrasto inter du tre malsamaj kulturoj. Vivo en en la rezervejoj ne plu similas al la vivo de la praavoj. La aborigenoj ne plu ĉasas kaj tro ofte nur atendas monon de la ŝtato por pluvivi.

Tiu sperto inspiris al Trevor Steele temon por lia lasta romano « Flugi kun kakatuoj ». En tiu tre leginda libro verkita en esperanto, li rakontas la renkonton inter koloniistoj kaj aborigena tribo kiu rezistas kaj rifuzas, ke oni prenu ĝian teritorion. Efektive, la britaj koloniistoj argumentis, ke posedanto de tereno povas esti nur tiu kiu prilaboras ĝin.

Estas sciate, ke aborigenoj ne estis plugistoj sed nur ĉasistoj kaj plukistoj. Forpelitaj de siaj terenoj, la aborigenoj estis flankenmetitaj, kvazaŭ sklavigitaj, viktimoj de novaj malsanoj kaj alkoholo. Ili atendis ĝis la sepdekaj jaroj por iĝi plenrajtaj civit-anoj.

La temo tre plaĉis al la ĉeestantaro kiu metis multajn demandojn al Trevor, preleganto tre vigla, afabla kaj humurplena. Post la prelego, la esperantistoj (ili ankaŭ venis de Manche, Orne, Seine-Maritime) kune vespermanĝis en apuda restoracio.

***Jean Colombel** (Le Havre)*




Prelego de Trevor Steele


## Prelego pri LANTI :

Hérouville-Espéranto, à côté de Caen, a accueilli le 29 novembre le père Marc, moine à l'Abbaye de Bricquebec, et espérantiste, pour une conférence sur Lanti. Rien à priori n'aurait dû rapprocher l'homme de Dieu et ce bouffeur de bourgeois et de curés qu'était Lanti. C'est parce que ce dernier avait vu le jour à Néhou, une bourgade proche de l'Abbaye, que Marc a d'abord prêté attention à cet espérantiste hors du commun mais un peu oublié aujourd'hui. Il a découvert un personnage haut en couleurs confronté à une première moitié du XXè siècle sacrément bousculée. A la lumière de ses lectures, de ses échanges avec des espérantistes du monde entier, et aussi de sa propre expérience intellectuelle, Marc nous a guidés dans les évolutions successives d' Eugène Adam, de son vrai nom, dans ses engagements politiques, dans ses projections sociales. Anationaliste et révolutionnaire, Lanti a fortement contribué à la création de Sennacieca Asocio Tutmonda qui a joué, et joue encore, un rôle important dans le mouvement. Après un carnet très critique tiré de son voyage de 1923 en Russie soviétique, Lanti a parcouru le monde avant de se donner la mort en 1947 au Mexique. Le père Marc nous a lu de très jolis extraits de l'œuvre de Lanti, nous révélant ses talents littéraires et la profondeur de sa réflexion qui par bien des aspects reste d'actualité. 25 personnes ont assisté à cette soirée, dont des amis de Seine-Maritime et de la Manche.

*Yves NICOLAS*



Marc Lemeltier prelegas pri LANTI : Eugène ADAM



Fotoj de Michèle LANGEOIS



Lanti 1879 - 1947





Marie Cornière, épouse légitime de Lanti, avec laquelle il vécut..... 6 mois en 1908.

## Citaĵo de Lanti.

Eble la nuna civilazacio pereos, kiel pereis la egipta, la greka, la roma kaj aliaj ; eble neniam stariĝos mondpaco en la mondo ; almenaŭ per la imago mi povis, dank'al nia lingvo, vivi tiun idealan vivon ; per mia aliĝo al S.A.T. mi havas la agrablan senton esti konscia ero de tiu embrio de sennacieca socio, kiun konsistigas nia mondorganizo.

En « Sennaciulo »

Oni kutime asertas, ke la normandaj devenuloj distingiĝas per manko de ĝeneralaj ideoj. Ĉu vere ? Kiam vi ĉi-supre (*vidu la 3an paĝon*) legas tiom ampleksan pripenson, vi ja scias, ke la aŭtoro estas tre interesa persono kaj vi deziras havi pliajn informojn pri liaj vivo kaj agado.

Eŭgène Adam, kiu fariĝis Lanti – post lia konvertiĝo al Esperanto naskiĝis en la vilaĝo de Néhou, en norda Maniko. La bonŝanco faris, ke li havis tre bonan instruiston kaj ke li legis en la vilaĝa lernejo la libron « La rondiro de Francio per du infanoj » : le temo estas la malkovro de ĉiuj partoj de la lando per du Alzacaj infanoj fuĝantaj kaŭze de germana invado dum la milito de 1870. Tiu-ĉi legado impresis Eŭgène kaj vekis ĉe li nerezisteblan alvokon por vojaĝi tra la mondo. Kiam li mortis en Meksiko en 1947, Afriko estis la sola kontinento, kiun li ne vizitis.

La necedigebla infano, post malserenaj diskutoj kun la gepatroj, forlasas la kamparan domon por fariĝi lignaĵisto. Se la laboristo tre rapide montriĝas lerta en la metio, la adoleskanto alfrontas teruran krizon. Post la legado de librojn de Renan kaj de la Biblio, la fidema sinteno en la katolika religio estas anstataŭigita per memstara pensomaniero : pensi per sia propra cerbo, estos unu el la aksiomoj de Lanti. Kaj la renkonto de Sébastien Faŭre kaj poste de Henri Neer enirigis lin en la anarkiistajn ideojn. De tiu momento li aktivis kiel sindikatisto.

Dum la unua mondmilito, li deĵoris kiel flegisto en akompano de 13 katolikaj pastroj ; unu el ili, Lecomte, instruas al li Esperanton.

Eŭgène Adam , kiu estas nun tridekkvinulo, spertas novan seniluziĝon : preskaŭ ĉiuj anarkiistoj iĝis promilitaj aktivistoj. Je la vido de tia returniĝo, li juĝas, ke ili ne estas kredindaj.

Krome, la flegisto kiu volis prizorgi ĉiujn vunditojn el ambaŭ kampoj, estas malakceptita de la Francoj kaj de la Germanoj. Tiu fakto ekkolerigas lin kaj li povus faris sian, la frapvorton de Prevert : « Kia stultaĵo la milito ! »

Malmobilizita, Eŭgène Adam daŭrigas kursojn por fariĝi profesoro en dezajno kaj dum siaj libertempoj aktivas kiel sindikatisto kaj esperantisto . Baldaŭ li gvidas esperantistan revuon en kiu li alportas novan kaj viglan spiritstaton. Krome, li membriĝas en Komunista partio.

En 1921, li fondas en Prago, kun tri aliaj Kamaradoj SAT-Amikaro-n. Per tiu medio li celas al edukado kaj samklasa konscio de la membroj.

En julio 1922, li foriras por viziti Sovetion. Miaopinie, liaj vojaĝaj impresoj estas la paĝoj la plej interesaj por konatiĝi kun la pensulo kaj lia verko. Plie, en la konkludaj paĝoj koncentriĝas la celo de Lanti, kiun li esprimas per kerneca stilo : « falinte de la alta idealeca turo, kie mi kutimis karesi kaj luli mian revon, mi sentas min hodiaŭ trege kontuzita. Dolora estas mia spiritstato. Tamen, sur la ruinaĵo de miaj kredoj, staras sendifekta iu ideo : la internaciismo. ....Mia hodiaŭa opinio pri solvo de la socia problemo povus resume esti eldirata per du imperativaj propozicioj :

Estu unu sola mono. Estu unu sola lingvo.

Paŝo plia kaj lasta restas al li : forlasi la internaciismon por la sennaciismo per aplikado de Esperanto tra la tuta mondo. Kiam ĉiu civitano el la mondo sentos sin mondcivitanon, la celo estos atingita. Ĝis tiu tago, ĉiu el ni devas alkutimiĝi je sennacia sent-pens-ag-maniero, pere de Esperanto.

En 1936, Lanti emeritiĝas kaj forlasas Eŭropon. Liaj amikoj bedaŭras la nefatigeblan batalanton, kiu tamen gardas en sia koro la vundojn de fratecaj bataloj, kies ĉefa fonto estas la pli kaj pli drivado en Sovietio : « la Socialismo en Sovetio estas ruĝa faŝismo », li diros.

Lanti alfrontas la dek lastajn jarojn de sia vivo tra la mondo : Japanio – Aŭstralio - Novzelando – Argentino – Ĉilio – Meksikio. Fakte la « mondcivitano » retroviĝas ofte « vagulo » pro tri kaŭzoj : lia tre maldekstra vojiro – la lingvaj bariloj – lia propra karaktero - la monaj devalutoj.

Malfeliĉe ankoraŭ ekzistas la landlimoj kaj la doganoj kaj...la policistoj !, precipe en la imperia Japanio. Pro tio, li devos eliri tre rapide la landon en kiu li pensis restadi longajn jarojn por helpi la viglajn esperantistajn grupojn.

La vagemulo faras en ĉiu lando la saman konstaton : ekzistas esperantistaj grupoj, kie kelkaj aktivuloj scipovas la lingvon kaj ĉirkaŭ ili multaj simpatiantoj nur komuniĝas je la ideo. Tial, esperanto, kiu de malproksime helpas interlandajn rilatojn, fariĝas surloke tre limigita medio.

La vulkana karaktero de Lanti faris, ke rilati kun li en la ĉiutaga vivo, estis prekaŭ ĉiufoje ne plezuriga. Multaj amikoj tra la mondo helpis al li kaj akceptis lin, sed ne por longa tempo.....

Kiel oni scias, en la jaroj 1930 kaj sekvaj, ni estis meze de mona kaj borsa disfalo. La dua mondmilito plimalbonigis la situacion tra la tuta mondo kaj la pensio de Lanti ŝrumpis kiel neĝo ĉe suno. Kiam li memmortigis en 1947, li ne plu havis sufiĉe por vivi. La memstaremulo bezonis la subtenon de kelkaj amikoj.


La filo de Néhou, al kiu la onklo Burlas trafe antaŭvidis : « vi estas tro serioza, Eŭgène. Mi timas ke la sanktuleto fariĝos herezulemulo ! » Lanti substrekas, ke dumvive li suferis pri mallakso. Li ankaŭ estis persekutita per memmortigaj tendencoj. Teruraj doloroj pro kapaj furunkloj okazigis la fatalan agon.

Lanti rakontas en sia biografio « Fredo », ke foje li pensis eniri la monaĥejon de Bricquebec, kiu situas proksime al lia naskiĝa vilaĝo.

Li poste herezumis kiam li vidis en Eklezio kaj en Patrio, la du detruendajn malamikojn. Sed li, kiu en sia junaĝo sentis sin malsimila al la aliaj, restis granda solulo, eĉ en sia edziĝa vivo, unue kun Marie Cornière (6 monatoj) kaj poste kun Kate Limouzin, angla esperantistino kuzino de Georges Orwell, kiu ankaŭ ŝi, ne povis longtempe restadi kun Lanti.

Kiu pripensas la hodiaŭajn problemojn, tiu povas malfermi la multajn verketojn de Lanti. Se la solvoj de li proponataj ne estas tuje aplikotaj, almenaŭ la leganto povos miri pro la vigla pensulo je la lapidara stilo. Li konatiĝos kun eksterordinara homo, ĝisoste esperantisto, majstro en la lingvo kiu tradukis je la admiro de fakuloj, la rakontojn de la mondfama verkisto, Voltaire.

*SEKVO : vidu paĝon 6an*




## LA FAJRO

Matenas, jam la oka, ekstere tero frostas,
Ses gradoj sub la nulo, ĉielo koloriĝas.
En mia varma domo, ĉie estas silento,
Ĉar tiuj kiujn sorto, en sia bonvolemo,
Al mia kunvivado decidis postenigi,
Min multe favorante, daŭrigas firme dormi.
En la kamenareo mi revigligis la fajron
Kiu krake provizas sian dancantan lumon.

Kiam plezurfonto estis por mi la korpo,
Kiam mi trovis ĝojon en peniga klopodo,
Kiam mi ne dubis pri miaj kapablecoj
Kaj haste ekflamiĝis pri noblaj idealoj,
Pri la dolĉaj spektakloj mi ne dediĉis tempon
Kaj, senpoeziulo, ne rimarkis la fajron.

Komforte sterniĝanta sur kanapo varmeta,
Pantofloj ĉe piedoj, per kusenoj blokita,
Nun, pro jaroj senelana, ŝatanta nur kvietecon,
Ekde mia kuŝejo mi admiras la flamon.
Feliĉa ĝin posedi mi fine ĝin rimarkas,
Kaj ve, povas kompreni, kiom la fajro belas !

Por mi same facilis manĝegoj aŭ fastoj ;
Tiam mi sentis timon nur pro veraj danĝeroj.
Pri horoj de ripozo, pri vestaĵo konvena,
Mi fiere afektis esti tute senzorga !
Nun pri ĉio atenta, mi uzas mian tempon,
Danka pri tiu resto, admirante la fajron.

Juna, ondoj de ĝojo ŝprucis en mia brusto,
Pro enventa parfumo, rideto de virino !
Mia bonstata korpo ĝuante materion
De spiritaj plezuroj neglektis la tendencon.
Mi ne estis poeto, mi ne introspektadis,
Kaj ke belas la fajro, la fakto min ne frapis !

Tiujn Gracajn eventojn mi sendanke malŝpa-
ris,
Kaj neniam iom, la penso min tuŝetis,
Ke eble iu Volo faras tiujn donacojn
Kies belo sugestas la supernaturecon.
Mi estus devinta ilin danke sapori,
Por ilin eble tiel, iom pli longe vivi.
Tiuj Gracoj ĉesiĝis, sed aliaj alvenas
Kiuj al mia aĝo multe pli konformiĝas.
La alta Donacanto, eble de la ĉielo,
Min permesas ekvidi kiom belas la fajro.

Sed ĉu Li ne postulos, post tiom da bonaĵoj,
Kiujn mi nedankeme dum pli ol ok dek jaroj,
Frandege konsumadis, ke mi lasu la vivon,
Ke mia karna korpo reiru al la teron ?
Mi, senekleziulo, min atendas infero,
Kie jam rezervita staras mia kaldrono !
Tro malfrue vidinta la kolosan vetaĵon,
Mi havos eternecon por admiri la fajron !

*Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures*

# Ĝenerala Asembleo 2012 en Hérouville Saint Clair (14)

Nia normanda asocio kunvenos ***dimanĉon 13an de majo*** en Maison des Associations de Hérouville Saint Clair (14 - Calvados) okaze de la vizito de **Roman Dobrzynski**. (*vidu suben*)

10h00 : Ĝenerala Asembleo

12h30 : Komuna tagmanĝo en la Maison des Associations. Bonvolu alporti manĝaĵon

15h00 : Prelego de **Roman Dobrzynski** : « ***Bona Espero*** ».

*Por informoj, bonvolu kontakti Yves NICOLAS : 06 44 87 22 48 / nicosibi@club-internet.fr*

Faru vian ĉekon profite de ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN

**Abon-kotizo por 2012 : 8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

**Cotisation**

**2012**

☐

*Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre cotisation 2012. Merci d'envoyer votre règlement (8 €uros à l'ordre d' « Esperanto -Normandie ») à l'adresse indiquée ci-dessus. Merci pour votre soutien !*

## Financa raporto je la 31a de decembro 2011

| *ENSPEZOJ* (Eŭroj) | | *ELSPEZOJ* (Eŭroj) | |
|---|---|---|---|
| **Ĉe CCP, la 31a de decembro 2010 :** | **2 623,96 €** | | |
| **Kotizoj :** De la 01/01/2011 ĝis la 31/12/2011 : | 629,00 € | **Bulteno :** Sendado : leterkovertoj + poŝtmarkoj : 476,80 Fakturo presisto : 215,00 | 691,80 |
| | | **Poŝtbanka** Administracio | 11,10 |
| | | **Subvencio** Hérouville Trevor Steele | 300,00 |
| **Sumaj ENSPEZOJ :** | **3 252,96 €** | **Sumaj ELSPEZOJ :** | **1 002,90 €** |
| | | **Ĉe CCP, la 31a de decembro 2011** | **2 250,06 €** |
| **Bilanco** | 3 252,96 | **Bilanco** | 3 252,96 |

*Sekvo de la paĝo 4a : « Pri LANTI »*

**Krome, la akravida kaj postulema gvatanto, konstatis per lokaj kontaktoj en Sovetunio, ke la Stalinismo estis « ruĝa faŝismo ». Li substrekis, ke la Marksisma filozofio ne estas nova religio kun ĉefoj, dogmoj, inkvizicio kaj mortigo de oponantoj, sed nur metodo kiu povas parte helpi por analizi la sociajn problemojn. Por li la tikla punkto estas tio : ĉiuj problemoj ne naskiĝas de ekonomikaj kaŭzoj . Ankaŭ la ideoj regas la mondon.**

**En nia nuna periodo, kiam mallumaj fortoj fontas ie-ajn en la mondo, estus bone relegi Lanti kaj memorigi lian aksiomon : la mondo estas ĥaoso, la homa tasko estas starigi ordon en ĝi.**

**Père Marc.**

**Bricquebec. La 14-an de februaro 2012.**

**Roman DOBRZYNSKI** estas elstara ĵurnalisto de Pola Televido kiu realigis multajn dokumentajn filmojn. Li esperantigis la lingvokurson de BBC « Mazi en Gondolando » kaj verkis ĉefverkon « La Zamenhof Strato » kiu konsistas el intervjuo kun la nepo de Zamenhof kaj estas tradukita en 16 lingvoj. Ankaŭ tre sukcesis lia libro « Bona Espero : idealo kaj realo ». Honora membro de UEA de 2005.

